

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1068 (38/2020)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Consiglio Direttivo FEI 2
- Starigo de nova literatura premio "Laŭro de la Akademio" 2
- CED reorganizigas sub nova estraro 2
- Commercialista fa rima con esperantista 3
- Le lingue inventate: come si fanno? 3
- Corso di esperanto via Zoom 4
- Quora 4
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton 5
- Por la mortintoj: La Nivelilo: 4

CONSIGLIO DIRETTIVO FEI

Il Consiglio Nazionale, eletto dall'Assemblea del 17 ottobre scorso, si è riunito via Zoom il 7 novembre, e ha eletto al proprio interno il Consiglio Direttivo, che durerà in carica tre anni. I singoli incarichi verranno distribuiti nella prima riunione del CD, che si terrà il 17 novembre prossimo. Auguriamo buon lavoro a tutti loro, e assicuriamo la nostra collaborazione!

Luigi FRACCAROLI (Presidente)

Laura BRAZZABENI (vicepresidente)

Michela LIPARI, Paola NIGRELLI, Riccardo PINORI,

Debora ROSSETTI, Ugo TONINI (consiglieri).

STARIGO DE NOVA LITERATURA PREMIO "LAŬRO DE LA AKADEMIO"

En 2020, la Akademio starigis novan literaturan premion "**Laŭro de la Akademio**" aljuĝota al libroj "arte signifaj, lingve perfektaj kaj evidente kontribuantaj al evoluigo de esperantlingva kulturo". Delonge tiu ĉi ebleco "doni premiojn al la aŭtoroj de la plej bonaj aperintaj verkoj" ekzistis inter la statutaj celoj de la Akademio, sed estis neuzita. La ĵurio, aprobita de la Akademio, konsistas el: Carlo Minnaja (Italio), Javier Alcalde (Katalunio), Edmundo Grimley Evans (Britio), Nikolao Gudskov (Rusio), Jesper Jacobsen (Francio), Valentin Melnikov (Rusio), Barbara Pietrzak (Pollando). La regularo estas konsultebla en la retejo de la Akademio: <https://www.akademio-de-esperanto.org/lauro>. Premiindajn verkojn bonvolu proponi al Carlo Minnaja carlo.minnaja@gmail.com aŭ iu ajn alia membro de la ĵurio. La unua limdato por propono de premiinda verko estas la **30-a de junio 2021**.

CED REORGANIZIĜAS SUB NOVA ESTRARO

La Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) estas branĉo de UEA, fondita en 1952 de Ivo Lapenna, kaj respondecas pri scienca esplorado pri la fenomeno Esperanto, ĝia movado kaj komunumo, kaj ĝia videbligo en sciencaj kaj intelektulaj rondoj ekster la movado. En aŭgusto 2020 Humphrey Tonkin, la direktoro de CED dum pli ol kvar jardekoj, transdonis sian gvidan postenon al Mark Fettes. Kunlaborantoj jam de multaj jaroj, la du universitataj profesoroj kaj eksprezidantoj de UEA interkonsentis pri la elprovo de nova organiza formo por tiu plej longdaŭra esplora centro de la Esperanto-movado.

CED nun konsistas el Konsilantaro, kiun nomumas la Estraro de UEA. En ĉi tiu momento, tiu Konsilantaro konsistas el jenaj homoj: Xavi Alcalde, Irene Caligaris, Renato Corsetti, Mark Fettes, Guilherme Moreira Fians, Michele Gazzola, Federico Gobbo, Kimura Goro, Alessandra Madella, Mélanie Maradan, A Giridhar Rao, Orlando E. Raola, Ida Stria, Angela Tellier, Humphrey Tonkin kaj Bernhard Tuidier. El inter la anoj de la Konsilantaro, Fettes kunmetis malgrandan estraron kun respondeco pri kvin ĉefaj agadkampoj, jene:

1. Esperantologio kaj interlingvistiko - Guilherme Moreira Fians (Esperantologiaj Konferencoj, revuo "Esperantologio") 2. Lingvopolitiko, precipe en internacia/interŝtata kadro - Michele Gazzola (LPLP, Nitobe-simpozioj) 3. Universitataj studprogramoj (pri Eo kaj rilataj temoj) - Angela Tellier (precipe kunordigo de projektoj por subteni/disvastigi tiajn programojn) 4. Bibliotekoj - Orlando Raola (unuavice Biblioteko Hodler; krome kunlaboro inter E-bibliotekoj ĝenerale) 5. Terminologio - ankoraŭ vaka (rilatoj de UEA kun TermNet, Infoterm; terminologia trejnado).

La bulteno "Informilo por Interlingvistoj" estas komuna informilo pri ĉiuj tiuj kampoj. Nuntempe ĝin redaktas Angela Tellier kun subteno de ESF (Esperantic Studies Foundation). La t.n. CED-Fonduso, same subtenata de ESF, donas modestajn subvenciojn por projektoj sur tiuj kampoj (unuavice Kampo 1). Pri la rilatoj inter ESF kaj CED Fettes mem zorgos, estante samtempe estrarano de ESF; Raola, kiel ano de la Estraro de UEA, zorgos pri ĝiaj rilatoj kun CED.

Demandoj kaj esprimoj de interesiĝo pri la laboro de CED estas bonvenaj ĉe la Direktoro, Mark Fettes <mtfettes@sfu.ca>.

COMMERCIALISTA FA RIMA CON ESPERANTISTA

Se qualcuno di voi è commercialista, o conosce un commercialista esperantista, per favore contatti Michela Lipari (michela.lipari@gmail.com) per una proposta di lavoro.

LE LINGUE INVENTATE: COME SI FANNO?

Tutti noi usiamo una lingua artificiale, inventata, che, a dispetto dei pregiudizi altrui, ha dato vita a una comunità culturalmente vivace e solida ormai da 133 anni. Noi usiamo più o meno regolarmente il lavoro di Zamenhof, che ammiriamo per la sua semplicità e per l'efficacia. Ma come gli è venuto in mente? Attraverso quali tappe del pensiero è passato, prima di decidere che il suo lavoro poteva essere pubblicato, nel 1887?

Le lingue "inventate" sono state moltissime, e vi suggerisco la lettura (non mi risulta purtroppo tradotto in italiano e/o esperanto) di **"In The Land of Invented Languages: Esperanto Rock Stars, Klingon Poets, Loglan Lovers, and the mad dreamers who tried to build a perfect language"** (*Nel Paese delle lingue inventate: rock star esperantiste, poeti Klingon, amanti Loglan, e i pazzi sognatori che hanno cercato di costruire una lingua perfetta* – sì, l'esperanto è proprio nel sottotitolo), della statunitense Arika Okrent. Film e serie televisive hanno inventato decine di lingue, dal Klingon di Star Trek al Dothraki del Trono di Spade: a cosa hanno pensato gli autori, mentre le ideavano? Leggete questo interessante articolo, e ne avrete un'idea. E non vi sfiori l'idea di inventarne una, quella che abbiamo va già bene così.

<https://www.ilpost.it/2019/09/14/lingue-inventate-dothraki-klingon/?fbclid=IwAR2uzVbqG7GNmmlI3PMjDOImLSHCNtNILvspNjTKA4iSRqU-JyOpNCLJKt4>

CORSO DI ESPERANTO VIA ZOOM

Il gruppo esperantista romano ha organizzato un corso base di Esperanto su zoom. Il corso avrà inizio lunedì 16 novembre alle 18 e si terrà ogni lunedì. Insegnante è Giorgio Denti presidente del gruppo. Mi piacerebbe sapere se qualche gruppo ha organizzato altri corsi online e invito chi non lo ha organizzato a pensare a qualcuno che potrebbe essere interessato a seguire il nostro.

Per qualsiasi informazione potete scrivere a me alla seguente e-mail:

debora.rossetti1611@gmail.com

QUORA

Grazie a Johano Karlo Rinaldo, è stata inaugurata una sezione di Quora intitolata "Esperanto, lingua per l'Europa" <https://it.quora.com/>. Quando aprite la pagina iniziale di *Quora*, cliccate sulla colonna di sinistra ove c'è permanentemente la citata sezione.

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON



LA NIVELILO

*La duan de novembro laŭ kutimo
vizitas ni mortintojn en tombaro.*

*Tion postulas amo kaj estimo,
por ĉiu estas ĝi deviga faro.*

*Kaj ĉiam akurate en ĉi-tago
al onjo Vinjo mi kun neva amo
alportas florojn por omaĝa ago*

kaj metas ilin tien por ornamo.

Ĉi-jare min okazis aventuro.

Ankoraŭ nun paliĝas la vizaĝo.

*Di-patrino! Mi svenis pro teruro,
sed poste ja revenis la kuraĝo.*

Jen la fakto! Aŭskultu min atente!

Alvenis jam la tempo de foriro.

*Mi marŝis malrapide kaj silente
kaj mi gapadis tombojn kun admiro.*

*“Nobelo kuŝas tie ĉi, la grafo,
reganto de Rovigo kaj Beluno”,
sed pereinta, laŭ la epitafo,
nur pro gripo dum lasta la aŭtuno.*

*Kaj jen sur ĉio estis la blazono
kaj sube lampoj, lumaj krucoj,
briloj,
tri roz-bukedoj kun funebra zono,
kandeloj, kandeletoj kaj lumiloj.
Apud la tombo de tiu sinjoro
estis alia tombo eta, eta
forlasita kaj eĉ sen unu floro,
sur ĝi nur unu kruco sed diskreta.*

*Sur la kruco apenaŭ oni legi
“Esposito Ĝenaro, balaisto”:
tiun tombon, laŭ mi, neniu flegis,
la mortinto ja restis sen asisto.*

*Mi cerbumis: jen estas nia vivo,
al iu ĉio kaj al iu nulo.*

*Tiu homo ne pensis, ho naivo!,
postmorte esti daŭre ĉifonulo..*

*Dum mian cerbon tenis ĉi-ideo
noktomeze sonoritis jam la horo,
kaj min kaptitan skuis timo-veo
inter la kandeletoj kun angoro.*

*Sed jen mi vidas en la malproksimo
nu, du ombrojn marŝantajn. Mi
vizias!*

*Ĉi-fakto, pensis mi, aspektas time
ĉu mi dormas, maldormas,
fantazias?*

*Ne fantazio, estis ja la grafo,
okul-vitro, cilindro kaj surtuto,
kaj malantaŭe marŝis kvazaŭ ŝafo,
trenante balailon, homa bruto.*

*La dua certe estis ja Ĝenaro
la balaisto, princo de mizero.
Ne estas ci-afere troa klaro,
ĉu mortintoj eliras en vespero?*

Kiam ili alvenis tre proksime

*la grafo haltis kaj jen ultimato.
Dolĉavoĉe sed firme kaj sentime
li diris al Ĝenaro: "Estimato!*

*De vi mi volas scii, vi fripono,
kial vi aŭdacas resti en ĉi-tombo
ĉe nobelo, ĉe homo kun blazono.
Eterne hontu pro via aplombo!*

*Mi favoras respekton al la plebo,
sed vi tenis vin kiel aĉa bubo;
via korpo rajtis ja al entombigo,
al entombigo, tamen, en la rubo.*

*Forpuŝas min ĉi tie la etoso
pro via apudeco kaj ...odoro.
vi nepre migru al pli taŭga foso,
al samrangula parto kaj sektoro".*

*"Grafa moŝto, ne estas kulpo mia,
vive ne farus mi tian perfidon.
Mia edzino estis ambicia,
mi ne povis kontraŭi la decidon.*

Se mi vivus mi igus vin feliĉa,

*mi mem transportus mian etan
ĉerkon*

*ĝuste nun, tuj, laŭ faro senkondiĉa,
kaj tuj ĵetus ĝin for al fora sterko".*

*"Kaj kion vi atendas, fuŝnaskito?
Ĉe mi ne estos pleba malmodero,
mi nobelas, alie pro incito
mi lasus nun liberon al kolero"..*

*"Nu, ek, montru nun ĉi tiun liberon!
Grafa moŝto, min tedas ĉi-debatoj.
Se mi estus vivanto, ne aero,
ni solvus la afero ja per batoj.*

*Sed ĉu vi pensas, ke vi estas Dio?
Mortinto mi, mortinto vi, ni samas,
malgraŭ via kontraŭa opinio.
Egalas ni, vi tion ne aklamas".*

*"Ĉu vi aŭdacas, vi porko bordela,
kompari vin kun mi, vin el provinco,
kun mi naskita en lito nobela,
nasko ja enviebla eĉ por princo?".*

*“Ne diru pri kristnasko aŭ pri pasko,
enŝtopu vian cerbon per humilo,
forgesu pri ĉi-klaŭna stultofasko.
La morto estas kio? Nivelilo!*

*Ĉiuj: reĝo, juĝisto, granda homo,
post paso de tombeja krado scias,
ke ĉio malaperis, eĉ renomo.
Vi pri tio ankoraŭ ne konscias.*

*Kaj do aŭskultu min, ne plu insistu,
akceptu min kaj "vivu" en komforto:
nur vivantoj stultumu kaj egoistu.
Seriozas la regno de la morto!“..*

*Totò (Antonio De Curtis)
Tradukis Renato Corsetti*